

Boletín[★]

DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

ROMULO GALLEGOS



I. L. E. I.
COLEGIO NACIONAL
Cursos de Esperanto

CALLOSA DE SEGURA (A icante)

DOÑA
BARBARA

DOÑA BARBARA, la fama romano de la venezuela aŭtoro Rómulo Gallegos, ĵus aperis, en el dono de la Venezuela Esperanto-Asocio, tradukita de nia elstara kunlaboranto Fernando de Diego. Pliajn detalojn legu en ĉi tiu numero de BOLETIN.

BOLETIN DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

Director:

Domingo Martínez Benavente

Redaccion y Administración:

Inés Gaston

Paseo Marina Moreno, 35, 4.º dcha.
ZARAGOZA

ADRESOJ

Federación Española de Esperanto
(Hispana Esperanto-Federacio)
Oficina Central:

Str. Rguez. S. Pedro, 13, 3.º, des. 7
MADRID-15

Prezidanto:

S-ro Angel Figuerola Auque
Str. Víctor de la Serna, 19, 7.º
MADRID-16

Sekretario:

S-ro José M.ª González Aboín
Oficina Central:
Str. Rguez. S. Pedro, 13, 3.º, des. 7
MADRID-15

Kasisto:

S-ro Gerardo Flores Martín
Str. Presidente Carmona, 2
MADRID-20
Čekkonto: N.º 8362-271
Banco Español de Crédito
Str. Diego de León, 54
MADRID-6

Libroservo:

Federación Española de Espe-
ranto, O. C.
Str. Rguez. S. Pedro, 13, 3.º, des. 7
MADRID-15

Informa-servo:

Federación Española de Espe-
ranto, O. C.
Str. Rguez. S. Pedro, 13, 3.º, des. 7
MADRID-15

Eldona Fakoj:

F-ino Inés Gaston
P.º Marina Moreno, 35, 4.º dcha.
Čekkonto: N.º 17917, Bc. Bilbao
Coso, 31
ZARAGOZA

Jarkotizo por eksterlando: 200 ptojn.

La enhavo de la artikoloj ĉi tie publi-
kigitaj ne reprezentas la oficialan
opinion de H.E.F., escepte en okazo
de oficiala komunikado; ĝi ankaŭ ne
reprezentas la opinion de la Redak-
toro; do, pri la artikoloj responde-
cas la aŭtoroj mem.

DONANTES DEL FONDO DE ADQUI- SICION DEL LOCAL EN PROPIEDAD (F.A.L.P.)

Pesetas

Suma anterior	328.225,—
Julián López Morales	500,—
Gerardo Flores	10.000,—
Eduardo Larrouy López	1.000,—
Luis de Otaola Faón	1.000,—
Lucas Alonso Villegas, G. F.	500,—
Sergio Docal	667,—
	341.892,—

Madrid, 19 de enero de 1975.

Gerardo Flores

Tesorero de H.E.F.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

N.º 15. Miguel Manteca López (N.º 1315)

N.º 16. Manuel Manteca López (N.º 6)

DONATIVOS PARA BOLETIN - 1974

Pesetas

Suma anterior	8.210,—
Evaristo Gil	50,—
Joaquín Comas	50,—
E. Roca	50,—
J. Perarnau	50,—
Jacinto Martín	50,—
A. Urgellés de Molera	50,—
P. Saumell	50,—
A. Colmenar	425,—
Urbano Gómez Collado	350,—
M. Izaola	50,—
T. A. Pettersson	50,—
J. Montfort	50,—
V. Hernández Llusera	25,—
J. Hernández	50,—
M. Cos	50,—
M. Vilagrán	50,—
María Nogués	25,—
Angeles Vilagrán	25,—
Un s-ano valenciano	100,—
E. Escriche	50,—
R. Bastardas	50,—
M. Sáiz	50,—
J. Osuna	50,—
M. Piquero	50,—
Vicente A. Díez	50,—
José Tallón	100,—
Clemente Mozas	100,—
Rafael Martínez	100,—
Pepita Gallart	150,—
William L. Nelson	101,—
Total	10.661,—

CURSOS DE ESPERANTO POR CORRESPONDENCIA DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

Centro Autorizado por el Ministerio de
Educación y Ciencia con el n.º 68

Forn, 21 - MOYA (Barcelona)

CONCURSOS

De acuerdo con las reglas generales establecidas para el Concurso Literario convocado por la Fundación ESPERANTO, y con el artículo 5.º de los Estatutos de la Fundación, el Patronato de la misma, nombró para formar el Jurado calificador a los siguientes señores: D. Carlo Minnaja, de Padova (Italia); D. Juan Devís Calpe, de Valencia; D. Pedro Nuez Pérez, de Barcelona, y D. Fernando de Diego de la Rosa, de Zaragoza.

Reunidos los miembros del Patronato de la Fundación, D. Miguel Sancho Izquierdo, D. Víctor Ortiz, y la Secretaria, D.^a Inés Gastón, esta última dio lectura a los informes recibidos de los miembros del Jurado; informes en los que se califican los trabajos presentados.

A la vista de los informes emitidos, se hace el cómputo de puntos, quedando en primer lugar el trabajo firmado por CIRMI, que recibirá el primer premio "Fundación Esperanto", y en segundo lugar el trabajo firmado por KAZIMIRA, al que se otorga el segundo premio "Fundación Esperanto". El premio "Francisco Máñez" quedó desierto.

A continuación se procedió a la apertura de los sobres de los trabajos premiados, resultando ser autores de dichos trabajos los señores, CIRMI — D. Vilmos Benczik, de Budapest (Hungría). Abonado a BOLETIN. KAZIMIRA — D. Vicente Hernández Llusera, de Sabadell (Barcelona). HEF-ano núm. 286.

Zaragoza a 15 de diciembre de 1974.

De acuerdo con las bases establecidas para la adjudicación del

PREMIO "CASANOVAS-FERRANDIZ"

de la Fundación ESPERANTO, y a propuesta del Grupo Esperantista "Biblioteca Balaguer" de Villanueva y Geltrú (Barcelona), el Patronato de la Fundación ha acordado adjudicar dicho premio a D. José M.^a Claramunt Claramunt, Sch. P., cuya desinteresada y eficaz labor en pro de la enseñanza y difusión del Esperanto, lo hace acreedor al mismo.

Zaragoza a 15 de diciembre de 1974.

Firmado: *Inés Gastón*
Secretaria del Patronato de la
Fundación ESPERANTO
y de los Concursos.

NOTA DE LA PRESIDENCIA

Se informa con carácter general a todos los socios que, en virtud de acuerdo tomado por la Junta General de la Federación Española de Esperanto, celebrada el 22 de julio próximo pasado, en Valladolid, se reitera la vigencia del acuerdo tomado por la Junta General celebrada en Mieres del Camino, en el sentido de que es necesario que la Federación edite un curso elemental de Esperanto que reúna las condiciones deseables para el aprendizaje de este idioma satisfactoriamente, sin menoscabo al valor y utilidad de los editados hasta la fecha por particulares. A tal fin se invita a quienes posean alguna obra de esta clase, que por alguna circunstancia no les haya sido posible editar hasta la fecha, la propongan a la Federación para su posible edición, si hay lugar a ello; enviando el manuscrito a la Secretaría de la Federación.

Asimismo se les informa que se ha cumplido la primera etapa de lo acordado por la citada Junta General de la Federación, en Mieres del Camino, respecto al proyecto de publicación de una antología de la literatura española e hispanoamericana, en Esperanto. D.^a Amalia Núñez Dubús ha llevado a cabo con eficacia y diligencia la labor de averiguación, compilación y registro de datos sobre esta materia que se le había encomendado, mereciendo por tanto nuestra más sincera felicitación.

LIBROSERVO DE H. E. F.

La Federación Española de Esperanto en junta directiva acordó reorganizar el Servicio de Venta de Libros (LIBROSERVO), con objeto de revitalizarlo y hacerlo más rentable, con la ayuda y comprensión de todos. Para este servicio que empezará a funcionar a partir de 1.^o de enero de 1975, se ha designado, con el consentimiento del mismo, al miembro de la junta "samideano" F. Gómez Martín.

En BOLETIN se irán publicando ciertas normas o consejos, según las necesidades lo aconsejen para el mejor funcionamiento del servicio. Mientras tanto se observarán las siguientes recomendaciones:

- 1.^a Los pedidos se dirigirán al domicilio de la Federación indicando en el sobre *PARA LIBROSERVO*.
- 2.^a Se expresará con la mayor claridad, cantidad de libros, títulos de las obras y dirección donde hayan de ser enviados los libros.
- 3.^a Los pagos se dirigirán por giro postal o transferencia bancaria a nombre de Libroservo H.E.F., c/c. 12.541 en Caja de Crédito Industrial Cooperativo, calle Cea Bermúdez, 56, Madrid-3.
- 4.^a Por medio de BOLETIN de H.E.F. se darán a conocer los títulos existentes y sus precios en pesetas. A los precios que se indiquen, para los envíos se cargará el 10 % por gastos de empaquetado y envío.
- 5.^a Con objeto de facilitar y estimular la compra de libros se admitirán cantidades parciales como plazos anticipados, o lo que es lo mismo, se abrirán cuentas personales (sin interés) con destino a la compra de libros. Cuando se desee adquirir un libro y no se tenga saldo favorable suficiente, se enviará el libro, contra reembolso de la cantidad que falte para completar el valor del pedido.
- 6.^a Siempre que se pueda, se recomienda el pago anticipado dirigido a la entidad bancaria indicada en el apartado 3.^o, ya que con ello se alivia bastante el trabajo de Libroservo al suprimirse los envíos contra reembolso.

NOTA: Téngase en cuenta, que los títulos de los que no se tenga existencia, se pedirán a sus autores y en muchos casos fuera de España, por lo que se servirán con cierto retraso.

Contando de antemano con la colaboración y comprensión de todos y con el lema que habremos de tener siempre presente, *COMPRA LIBROS CON CUALQUIER MOTIVO E INCLUSO SIN EL*, os saluda atentamente,

Por LIBROSERVO H.E.F.
F. Gómez Martín

IOM PRI NIA ĈIJARA KONGRESURBO

Lérída, nia kongresurbo por 1975, situas en la kataluna Pireneo, apud la valo de la rivero Segre. Ĝi estas ĉefurbo de la provinco.

La novaj avenuoj kun modernaj konstruaĵoj kaj belaj ĝardenoj, kontrastas kun la centro de la urbo, kie sur monteto elstaras la antikva "Seo" kaj la ruinoj de la "Zuda", fortikaĵo, kies restaĵoj estas tiel modifitaj de la sinsekvaj arkitekturaj ŝanĝoj ke ne eblas difini ĝian originon. Ŝajne, ĝia strukturo apartenas al la V^a jarcento; la araboj modifis ĝin kaj uzis la fortikaĵon kiel moskeon. Kaj, super ĉio, ĝia strukturo estis ŝanĝita laŭ la romanika kaj gotika gusto de la kristanoj. En ĝia origino, la "Zuda" estis religia konstruaĵo, poste rempar-palaco de arabaj favoratoj; denove templo kaj kastelo kristana ĝis la starigo de la "Seo", kaj fine, ĝi estis palaco de la aragonaj reĝoj.


En 1203, dank' al la entuziasmo kaj decidemo de episkopo Gombaldo de Camporrelles estis ebla la naskiĝo de tiu "Seo", kiu estis konsekrita en 1278. La sortoŝanĝoj de la templo estis multnombraj kaŭze de ĝia situo kaj historiaj avataroj; tial, nuntempe, la templo troviĝas sen religiaj ornamoj, sen skulptaĵoj kaj preskaŭ sen tomboj por faciligi ĝian rekonstruadon.

La templo konsistas el tri navoj, ĝi havas eksterordinaran klostron-belvederon kaj grandiozan kampanilon. En tiu konstruaĵo estas ja interesa la mikso de arkitekturaj stiloj kaj la kolekto de ornamaĵoj en ĝiaj enirejoj, konzoloj, kapiteloj, gargoĵoj, kornicoj, aĵuroj...

La "Seo" estas ĉirkaŭata de serio da muregoj historie grandvaloraj, de la roma epoko ĝis la unua enlanda milito. Inter ili elstaras la muregoj de la franca epoko laŭ la fortikiga sistemo de la militista inĝeniero Vauban.

Ambaŭ konstruaĵoj, la "Seo" kaj la "Zuda", kiuj estis deklaritaj Naciaj Monumentoj, alte parolas pri la historio de Lérída.

Multe ni povus ankoraŭ paroli pri la malnova parto de la urbo, same laŭ



La blazono kaj legendo de Lerida en la ĝardenoj de la antikva «Seo»

historia kiel laŭ arta vidpunkto, sed ni ankaŭ devas prezenti, kvankam skize, la novan parton de la urbo en nia unua artikoleto pri la ĉijara Kongresurbo.

Novaj avenuoj, kiel tiuj de "Madrid", "Las Garrigas", la "Gran Paseo de Ronda", "General Mola"... La novaj kvartaloj kunfandiĝas kun la fekunda hortaro.

La industria impulso aperis en ĉi tiu urbo kaj ĝia provinco nete agrikultura, kio devigas la starigon de novaj urbaj kaj industriaj kvartaloj.

Ni ne povas fini ne menciante la du grandajn parkojn de la urbo. La malnovan kaj faman "Campos Eliseos" kies beleco kaj trankvilo invitas al meditado, kaj la novan kaj allogan parkon "Alcalde Pons", kies komplekso de naĝejoj bonege pretigitaj kaj vastaj verdaj zonoj faras el ĝi, ĉefe dum somero, agrablan ripozejon post la ĉiutaga tasko.

Inés Gastón

RESPONDO DE PROF. D-RO LAPENNA

21.11.1974

Al la redaktoro de
"Esperanto",
Rotterdam.

Estimata redaktoro,

D-ro Sadler alportis al mi antaŭ deko da tagoj vian leteron de 08.11 responde al mia letero de 03.10, per kiu mi petis vin publikigi la kaŭzojn de mia eksigo. Mi ne respondis tuj, ĉar mi unue deziris konstati kion vi skribis pri la neaperigo en la revuo. Hodiaŭ matene venis la novembra "Esperanto" kun viaj komentoj "Por ke estu klare". Fakte, la titolo devus teksti "Por ke plu estu malklare". La tuta tono estas ege malĝentila, sed multe pli gravas la unuopaj asertoj kaj komentoj. Necesus reagi je preskaŭ ĉiu linio, sed mi limigos min al tio, kio ŝajnas al mi la plej esenca:

1. Se vi fakte opinias, ke la eksigoj de mi mem, de la Honora Prezidanto de la Asocio, de honora membrino kaj komitatanino, de du pliaj komitatanoj, de aliaj elstaraj personecoj estas "minoraj aferoj", tiam vi aŭ ne komprenas la gravecon de la kaŭzoj, kiuj devigis nin eksigi, aŭ komprenas, sed volas bagateliĝi la tutan aferon kun la celo teni la membraron en obskuro. Neniu uzis "gigantajn adjektivojn" sed fakte ege modestajn kvalifikojn, se oni objekte juĝas la kaŭzojn kaj sekvojn.

2. Mi rigardas la fakton, ke la nuna gvidantaro decidis ne publikigi mian tekston kiel vere senprecedencan skandalon ne nur en UEA, sed en kiu ajn kultura organizaĵo en la demokrata mondo. Vi skribis, ke la diversaj funkcioj "eksigis pro la samaj aŭ similaj kaŭzoj" kaj vi false kredigas la membraron, ke la publikigo de la letero de Prof. Régulo Pérez estas kontentiga solvo. Fakte, kiel vi ne povas ne scii, la plej profunda kaŭzo ja estis la sama, sed ĉiu el la eksigintoj havis ankaŭ siajn proprajn, apartajn motivojn. Estu kiel ajn, ne dezirante paroli en la nomo de la aliaj, mia fundamenta rajto en demokrata organizaĵo estas kaj restas ekspliki al la membraro, kiu pere de la delegitoj kaj ĉefdelegitoj elektis min komitatano B, la verajn kaŭzojn de la eksigo. Ili estas absolute ĝustaj, kion konfirmis ankaŭ abundaj pliaj dokumentoj post Hamburgo; sed eĉ se ili ne estus ĝustaj, vi kaj la nuna gvidantaro havas nenian rajton juĝi pri tio. Estas mi, kiu respondecas pri deklaroj subskribitaj de mi, certe ne vi aŭ kiu ajn alia.

3. Estas eĉ pli granda skandalo polemiki kun la enhavo de nepublikigita teksto kaj plian fojon faradi komplete misgvidajn komentojn. Mi neniam "arogis" ian rajton "esti la sola defendanto de la neŭtraleco de UEA kaj la definitiva interpretanto de la asocia Statuto", kiel vi asertas. Sed ja estis kaj estas mia rajto defendi la neŭtralecon de UEA almenaŭ tiom, kiom tiuj rajton havas kiu ajn membro. En la punktoj, kiujn mi tuŝis en la eksiga teksto, la Statuto kaj Regularoj estas tiel klaraj, ke interpretado eĉ ne estas necesa.

4. Estas plia skandalo diri, ke en tiu teksto troviĝas "nenio nova" kaj ke ĝi "ripetas la akuzojn kaj donkifotaĵojn, je kiuj svarmis la aprila ĉefartikolo". Eĉ se temus pri kiu ajn malĝustaĵo en tiu artikolo — kaj ĝi enhavas nenion — kun kia rajto vi uzas tiajn impertinentajn esprimojn? Kaj kun kia rajto vi plian fojon grave misinformas la membraron? Cetere, vi kontraŭdiras vin mem, ĉar aliloke vi ja rekonas, ke ekzistas "parto de nia legantaro, kiu interesiĝas pri la afero". Kial do tiu parto ne rajtus mem juĝi pri la ĝusteco de miaj asertoj kaj la praveco aŭ malpravenco de mia starpunkto? Kial vi devigas ĝin fidi je viaj juĝoj pri teksto, kiun vi intence prisilentas al ĝi? Tiajn metodojn, kiel vi bone scias, oni aplikas en totalecaj sistemoj, kaj ankaŭ en la Esperanto-Movado bedaŭrinde 2-3 periodaĵoj agis same antaŭ Hamburgo kaj daŭrigas post Hamburgo. Al ili nun aliĝis ankaŭ "Esperanto". Cetere, kiel etan fran-

daĵon vi certe legis la raporton pri la UK, verkitan de komitatano Svitak kaj publikigitan en n-ro 6 de "Starto". Mi aldonas kopion de mia letero al tiu komitatano.

5. La lasta skandalo, kiun mi tuŝos, estas via aserto, ke la "organiza krizo ekzistas nur en la kapoj de tiuj, kiuj la Asocion —ĉar ĝi ne plu estas gvidata de ili— volonte vidus disfalanta kaj malintegriĝanta". Antaŭvidi, estimata redaktoro, neniel signifas deziri aŭ en kiu ajn senco kuraĝigi. Mi mem ja ekŝiĝis el ĉiuj funkcioj pro kaŭzoj, kiujn vi kaŝas al la membraro, kaj per tio mia agado finiĝis. Mi lasis kaj plu lasos al ĉiu unuopulo decidi mem kion li aŭ ŝi faros. La personoj, kiuj respondecas pri tiu tuta situacio, kiun vi rigardas "minora", jam nun deziras fuĝi de siaj respondecoj disfamigante, ke mi kvazaŭe postlasis "katastrofan financon", "katastrofan internan staton" pro iaj "kvereloj" ktp. kaj ke mi, pro la ekŝiĝo kaj malakcepto de honora prezidanteco, kvazaŭe volus kontribui al "disfalo kaj malintegriĝo". La fakto estas, ke pri la financa deficiito en 1973 nete respondecas la estrarano pri financoj kaj —mi vere bedaŭras tion diri— ankaŭ d-ro Sadler, kiu dum la tuta jaro 1973 misinformis min pri la minacanta deficiito. Eĉ pli, la direktoro de la CO per sia letero de 01.11.73 eksplicite asertis, ke la enoficigo de vi kaj f-ino Zlotnikova povos okazi "sen grandaj timoj el financa vidpunkto". Tio evidente, rilatis al financoj por 1974. Kaj eĉ en tiu letero nenio estis dirita pri la minacanta deficiito en 1973. Kial oni prisilentas al la membraro tiujn faktojn? Cetere, ekzamenu iom la financojn ekde 1948 kaj vi facile konstatos, ke grandega parto de la kapitalo ŝuldiĝas al iniciatoj kaj realigoj de miaj intimaj gekunlaborantoj kaj de mi mem. La deficiito de 60.000 gld. egalas precize al la sumo kolektita por la "ĉambroj". Ĉu vere vi kredas, ke mi mem, kiu klopodegis havigi ankaŭ tiun sumon, ne suferis pli ol kiu ajn alia vidinte, ke ĝi estis elspezita en unusola jaro? Kial ĉion ĉi oni prisilentas? Kaj ankaŭ la fakton, ke malgraŭ la sistemaj atakoj kontraŭ mi persone kaj kontraŭ UEA sub mia prezidanteco aŭ, pli frue, ĝenerala sekretarieco; malgraŭ la daŭra eligado de tranĉiloj el la dorso kaj luktado per la brusto por nia afero, la nombro de la individua membraro kreskis kaj la kapitalo preskaŭ deobligiĝis? Memoru, ke la nombro de la membroj fine de 1973, precipe de la individuaj membroj, estis, kun unusola escepto, la plej granda en la tuta historio de UEA. Memoru bone ankaŭ, ke malgraŭ tiu deficiito de 60.000 gld., pri kiu mi havas absolute neniun respondecon, la kapitala konto malaltiĝis je nur 10.000 gld. Prisilenti ĉion ĉi al la membraro, aŭ ne emfazi tion kun la celo prezenti la financon situacion kiel "katastrofan", estas grava malvero, per kiu oni volas prepari la membraron al la katastrofo, kiu fakte venos kaj pri kiu, kompreneble, oni tutcerte kulpigos min.

Fakte, ĉio dirita en tiu ĉi punkto estas bone konata al vi. Mi tamen skribis iom pli detale pri la afero, ĉar mi havas la impreson, ke la ricevontoj de la kopio ankoraŭ ne estas sufiĉe informitaj.

6. Fine, denove vi parolas pri "sterilaj polemikoj", kvankam vi scias perfekte bone, ke neniam temis nek temas pri "polemikoj" sed pri hontindaj kaj sistemaj atakoj, kiuj daŭris dum jaroj. Cetere, kie vi estis kaj kie vi aŭdigis vian voĉon por "paco", kiam oni dissemadis plej fantaziajn malveraĵojn kaj ĉiaspacajn misprezentojn? Kial nun vi aŭ la nova Estraro ne reagas je la sendubaj misprezentoj de Heroldo pri la hamburgaj eventoj? Ĉu vi aŭ la nuna Estraro jam skribis protestan leteron al "Starto" pro ĝiaj "honestajoj" en ligo kun la UK en Hamburgo?

Pri unu punkto en via komento mi tute konsentas: "Ankaŭ en la Esperanto-Movado oni rajtas atendi iom pli da tiu kondukmaniero, kiun oni postulas de la sportistoj, senrigarde ĉu ili venkas aŭ malvenkas". Kompreneble, sub la kondiĉo, ke oni ne enverŝu venenon en la trinkaĵon de la sportistoj-kontraŭuloj. Ankaŭ mi estis sportisto kaj scias iom, eble pli ol vi, pri la normala konduto inter sportistoj.

Tiom por via orientiĝo pri mia starpunkto. Nepre ne necesas respondi al tiu ĉi letero, ĉar ĉia ajn plua korespondado estus ne nur superflua kaj temporaba, sed ankaŭ sensenca.

Kun salutoj,
Dro. Lapenna

SEKVOJ EL LA HAMBURGA PUĈO

Ne ekzistas organiza krizo («Esperanto», novembro 1974)

KLERIGA KONVERSACIA KLUBO - (STUDENTA ESPERANTO KLUBO)
KOPENHAGO (Danlando)

REZOLUCIO.

La ĝeneralkunveno de Kleriga Konversacia Klubo (Studenta Esperanto-Klubo), Kopenhago, la 24-an de septembro 1974, pritraktinte raportojn pri la kunsidoj de la Komitato de UEA dum la 59-a Universala Kongreso de Esperanto en Hamburgo,

konstatas, ke en la agado de UEA ne regas tiuj principoj de bonorda kaj digna organiza vivo, kiuj estas nepre sekvindaj, por ke nia tutmonda asocio povu sukcese labori laŭstatute por sia celo,

kondamnas, ke la traktadoj dum la komitataj kunsidoj evoluis tiel, ke prof. d-ro Ivo Lapenna — kies alte kvalifikita kaj senlaca aktivado dum multaj jaroj por la Internacia Lingvo grave kontribuis por havigi al nia movado ĝiajn ĝisnunajn atingojn — kaj aliaj meritplenaj agantoj de la movado trovis necese retiri sin de siaj funkcioj en UEA,

deklaras, ke pro la menciitaj faktoj la klubo ne povos daŭrigi sian membrecon en UEA per la membreco en DEA, kaj sekve,

decidas, ke la klubo ĉesigu sian membrecon en DEA kun efiko de la 1-a de julio 1975 kun la rezervo, ke la decido eksvalidiĝos, se la ordinara ĝeneralkunveno de DEA en 1975 decidus fari celtaŭgajn paŝojn por kontribui al enkonduko de principoj de bonorda kaj digna organiza vivo en la agadon de UEA aŭ decidus ĉesigi la membrecon de DEA en UEA.

ITALA ESPERANTO FEDERACIO

Rezolucio aprobita la 16-an de septembro 1974 en Verona okaze de la IEF-sembleo.

La italaj esperantistoj, kunvenintaj en Verono okaze de la 45^a Itala Kongreso de Esperanto

e s p r i m a s

siajn plenajn senkondiĉajn estimon kaj dankemon al prof-ro Ivo Lapenna, al kies senlaca, elstara, longjara gvidado la tutmonda esperanto-movado ŝuldas atingojn kaj sukcesojn senkomparajn;

p l e n d a s

pro la maniero, per kiu en la Kongreso de Hamburgo oni eksigis lin de la Universala Esperanto-Asocio, kiu havis en li ĉiam ne nur prestiĝan estron, sed ankaŭ firman garantianton de la neŭtraleco, nepre defendenda en la estonto, por ke estu certigata la ekzisto mem de nia lingvo;

p r o k l a m a s

dankeme prof-ron Ivo Lapenna honora membro de Itala Esperanto-Federacio kaj invitas la estraron de la Federacio kontaktigi kun li por ke li partoprenu ĝian societan agadon ankaŭ ĉeestante, kiel ĉiam ŝatata gasto, ĝiajn naciajn kongresojn kaj manifestaciojn.

SARLANDA ESPERANTO-LIGO

1974-11-23

Al la Delegitoj de UEA en FRG

Estimataj Sinjorinoj kaj Sinjoroj.

Kiel konate en la Hamburga kongreso Prof. D-ro Ivo Lapenna ekŝiĝis el ĉiuj siaj funkcioj en UEA. Ne ĉiuj delegitoj de UEA en FRG partoprenis tiun kon-

greson aŭ povis surloke sciigi de Prof. Lapenna mem pri la motivoj devigintaj lin je tiu grava paŝo. En la Esperanto-gazetaro oni ĝis nun vane serĉis ion pri tio: la periodaĵo "Heroldo de Esperanto" jam delonge estas kontraŭ Prof. Lapenna kaj la nova reĝimo de UEA ne plu donos al li lokon en la revuo "Esperanto" por informi liajn elektintojn kaj subtenantojn. Ĉar estas neverŝajne, ke "Germana Esperanto-Revuo" informos siajn legantojn, ni decidis, ke Prof. Lapenna klarigu sian starpunkton per aparta cirkulera artikolo distribuota de nia Ligo.

Niaflanke ni aldonas al la skandalaj eventoj niajn proprajn komentariojn:

- 1) Ni bedaŭras pli ol profunde, ke inter la komplotintoj de Hamburgo troviĝas du estraranoj de GEA: Werner Bormann kaj Uwe Joachim Moritz.
- 2) Post skriba demando al la prezidanto de GEA ĉu GEA distancigos sin de la hamburgaj eventoj kaj la riproĉo ke fortoj en GEA kontribuis al la faligo de Prof. Lapenna, Bormann telefone informis nin, ke UEA ne bezonas scienciston sed manaĝeron kiel prezidanton. Poste li skribis kontestis la kunagadon en la komploto kaj refoje akcentis la neceson de ŝanĝo en UEA pro la stagnado. (Kiam oni aplikos la saman teorion al GEA?)
- 3) Post tiuj provoj de elturniĝo flanke de GEA, SEL decidis ekŝigi el GEA kaj ne plu perĉi membrecojn al ĝi. (Tiun paŝon, je kiu devigis nin GEA mem per sia sinteno, la GEA-estrarano Nischwitz impertinente nomis "kuirado de separatisma supo".)
- 4) Ni lasas al la bontrovo de ĉiuj ricevintoj de tiu ĉi letero kiel ili deziras reagi je la artikolo de Prof. Lapenna. Du konsideroj ŝajnas al ni tamen gravaj:
 - a) la rajto de la delegitoj ekscii veron ne per tiu ĉi ĉirkaŭvojo sed el la organo mem de UEA; je tiu rajto ĉiu insistu, se li ne deziras, ke oni konscie lin trompu;
 - b) se la nuna UEA rifuzos al li tiun rajton, ĉiu devas sin demandi, ĉu li per plia membreco deziras kulpigi je silenta akcepto de ekstreme hontindaj okazintaĵoj aŭ ĉu ne estos konsekvence kvitanci tiun trompon de la publiko per senprokrasta ekŝigo.

Kun alta estimo

(sign.) Heinz Dieter Maas, prezidanto
Hans-Joachim Heintz, vicprezidanto
Reinhard Haupenthal, sekretario
Walter Ehrmantraut, kasisto
Günther Becker, honora prezidanto

VALENCIA (Hispanujo)

5-1-75

Prof. Dro. I. Lapenna
Wembley
BRITUJO

Altestimata Profesoro: Dum la lasta Zamenhof-festo, la Valencia Grupo de Esperanto decidis unuanime komuniki al vi la sekvantajn rezoluciojn: BEDAŬRI tre sincere vian ekŝigon de la altaj postenoj en la Movado, malgraŭ la altaj voĉdonoj favore al via persono.

MALAPROBI la kampanjon kiu decidis vin tion efektiviĝi.

DANKI vin tutkore pro viaj penoj en la brila gvidado, kiu plialtigis la gravecon kaj la prestiĝon de U.E.A.

AGNOSKI vian sindonemon, ĉar viaj kvalitoj kaj meritoj estus pli profitigaj al vi en ia ajn sfero: politika, instrua aŭ diplomacia.

PETI de vi bonvole akcepti la Honoran Prezidantecon de nia Grupo. Kaj ni faros la demarŝojn por ke la Estraro de Hispana Esperanto-Federacio tion faru, ankaŭ por nia nacia organizo.

ESPERI ke, en proksima estonteco, vi daŭrigu gvidante nin, por la plej sekurigaj kaj prestiĝaj stato de nia Movado.

La Prezidanto de V.E.G.
Johano Devís Calpe

Prof. Dro. Ivo Lapenna
77 Grasmere Avenue
WEMBLEY, Middx.
(Britujo)

Tre atestimata Dro. Lapenna,

Okaze de la 115-a naskiĝdatreveno de Dro. Zamenhof, kreinto de la Internacia Lingvo, ni, geanoj de la loka esperanta societo "FIDO KAJ ESPERO" el Valladolid sendas al vi la esprimon de nia simpatio.

Ni dankas vin pro la senlaca kaj konstanta laboro farita de vi dum multaj jaroj por la progresigo de Esperanto tra la tuta mondo kaj ni ege bedaŭras ke la lastaj okazintaĵoj devigis vin demisii de ĉiuj funkcioj en U.E.A. kio ja certe estas grandega perdo por la internacia esperanta movado.

Kelkaj el ni havis la plezuron saluti vin persone okaze de la U. K. okazinta en Madrido kaj tiam ni povis ĝui aŭdante vian belan kaj elegantan parolstilon.

Akceptu kara kaj estimata Dro. Lapenna la esprimon de nia simpatio.

POR LA VALLADOLID-A GEESPERANTISTARO
F. Castañón. Mariano Cantalapiedra. Angel Diez

ZARAGOZA (Hispanujo)

Al Prof. D-ro Ivo Lapenna
Wembley, Middx.
BRITUJO

Atestimata Sinjoro:

La estraro kaj membroj de la aragona Esperanta Societo "FRATECO" —kaj ankaŭ aliaj esperantistoj ne *fratecanoj* kiuj partoprenas en ilia sama esperantisma sento— deklaras, okaze de la Zamenhofa Tago,

ke ili senrezerve solidariĝas kun la persono kaj la ĝustaj sinteno kaj principoj de d-ro Ivo Lapenna, kaj bedaŭras, ke la nova situacio kreita el la manovroj manifestiĝintaj en la Universala Kongreso de Hamburgo, tute kontraŭaj al la signifo kaj filozofio de la esperantismo, minacas grave endanĝerigi la efektiviĝon de la *bela sonĝo de l' homaro*, la aspiron, kiun ni fervore proklamas en la kunkantado de nia Himno.

Zaragoza, la 15-an de decembro de 1974.

Miguel Sancho Izquierdo
Prezidanto

(sekvas subskriboj de ĉiuj geesperantistoj kunvenantaj en tiu tago. Entute 63)

DOÑA BARBARA

ALIA ATUTO DE NIA TRADUK-LITERATURO!

Ni ĝojas anonci la ĵusan eliron de nova eventa libro en la Esperanta tradukliteraturo internacia. Ĉi-foje temas pri la furora DOÑA BARBARA, de la venezuela aŭtoro Rómulo Gallegos, unu el la kulminoj de la romanarto de Iber-Ameriko, senĉese aperanta en milionoj da ekzempleroj ekde 1929, tiel populara en la tuta hispanlingva Ameriko, kiel *Don Quixote* en Hispanio.

La absorban romanon de Gallegos, eldonitan de la Venezuela Esperanto-Asocio, tradukis kun pleja fidelo al la stilo kaj al la etoso de la originalo nia elstara kunlaboranto Fernando de Diego, kies venezuelaneco helpis lin senmanke interpreti la specialan karakteron de la libro, kie vibras la esenco de la venezuela idiosinkrazio, plena de impeto kaj pasio.

Pri DOÑA BARBARA en esperanto opinias Henri Vatré, nia konata aŭtoro kaj recenzisto: «*La traduko impresas mirinde klara kaj posedas la netan rigoron de la kabea stilo en 'La Faraono'.*»

La Esperanta versio de DOÑA BARBARA, en bela volumo de 265 paĝoj, en formato de 16 × 21, kaj kun enkonduko de la tradukinto, kostas 300 pesetojn. Mendojn de loĝantoj en Hispanio akceptas la Eldona Fako de la Hispana Esperanto-Federacio, Paseo Marina Moreno, 35, 4.º dcha. Zaragoza. Eksterlandaj samideanoj sin turnu por aĉeto al Venezuela Esperanto Asocio, Apartado 3833, Caracas 101, Venezuela, aŭ al siaj kutimaj liverantoj.

Antaŭ la neebleco respondi ĉiujn salutkartojn ricevitajn okaze de Kristnasko kaj la Nova Jaro, mi kore dankas la afablajn salutintojn pro iliaj bondeziroj.

Samtempe, mi kaptas la okazon por danki al ĉiuj legantoj de BOLETIN, same enlandaj kiel eksterlandaj, iliajn kuraĝigajn vortojn rilate al nia laboro kiel esperantistoj, kaj al mi, kiel respondeca redaktoro de nia revuo. Dum la tuta jaro mi ricevis tiajn kuraĝigajn vortojn, sed ili multobligis de post la apero de la septembra-oktobra numero de BOLETIN.

Estas ja kurioza la fakto, ke malgraŭ la diversaj esprim-manieroj per kiuj ili esprimas siajn reagojn, ĉiam favorajn, (la nura nefavora aperas kompleta en ĉi tiu numero), preskaŭ ĉiu deziras al ni sanon por ke ni daŭrigu en nia laboro. Mi kopios kelkajn el ili; mi ne citos la nomon nek la lando de la subskribintoj pro prudento. Por iuj el ili ne estus oportuna mia mencio.

"...Ni deziras al vi sanon kaj kuraĝon en la grava laboro de vi entreprenita. Koran dankon!"

"...Mi legis vian organon, sinceran dankon pro via laboro kaj sanon por ĝin daŭrigi."

"...Nova sano! nova kuraĝo, novaj vivoĝoj kaj paco. Ni legas kun intereso niajn Boletin kaj aplaŭdas viajn opiniojn. Pri tio ni skribis ankaŭ al M. C...."

"...En via lasta "Boletín" speciale plaĉis al li la artikolo "REVUO DE LA REVUOJ", de s-ro Fernando de Diego. Mi dankas al li!"

"...Kvankam mi ne dubas, ke Via bonfarto relative al viaj meritoj estas perfekta, okaze de la Kristnaskaj festoj estas mia deziro, ĝi ankoraŭ pliperfektigu en la venonta jaro por la bono de nia Zamenhofa celo!..."

Inter tiuj ricevitaĵoj de la hispanaj samideanoj mi citos nur kvar. La unue ricevita de S-ro Sacramento Collado, tekstas jene: "...Mi ĵus ricevis la lastan numeron de "Boletín" kun interesaj informoj pri la Kongreso de Valladolid kaj la Universala Kongreso. Pri tiu ĉi mi bedaŭras tutkore la eksiĝon de la Prezidanto de U.E.A. Ivo Lapenna, kaj aliaj estraranoj kiel Thierry, Régulo, Vermaas, Waringhiem, E. Lapenna kaj aliaj..."

Dro. Régulo Pérez skribis: "...Mi legis iom rapide la lastan kajeron de "Boletín", kie vi, F. de Diego kaj S. Gumá bele draŝas la hamburgajn komplotintojn. ...Mi dankas kaj gratulas vin, Fernandon kaj Salvadoron por la kuraĝo elpaŝi kaj prezenti al la mondo vian komprenon de la situacio post kiam la komplotintoj kaperis la gvidadon de UEA..."

Al Dro. Herrero ni devas danki jenaj vortojn: "...Mi skribas tre malofte, sed mi konstante taksas tre alte vian kontribuon al la subteno de nia komuna celo, ellasata de plejparto de samideanoj!"

Kaj fine, la ĵus ricevita.

AKROSTIKA DIVENAĴO

Interesan virinon mi preparolas,
Nelaceble agantan por Esperanto.
Evidente la venkon nian ŝi volas,
Sindediĉon montrante en tunokvanto.
Glatkvazaŭe ŝi vartas la HEF-organon,
Altigante la ĝian lingvonivelon
(Senhezite mi diras: tion ŝi emas).
Tutbaldaŭe divenas ni ŝian manon
Okulum-rigardante la bultenŝelon.
Nu! Ĉu vi jam divenis pri kiu temas?

Alcibiades González Meana

La Felguera la 7-an de januaro 1975.

Eble, iu pensos ke mi fanfaronas, sed mi estas certa ke la subskribintoj de tiuj opinioj ĝojos pro ĝia publikigo, kaj, plurfoje, troa modesteco povas kaŝi nedankemon kaj pli grandan fierecon.

Inés Gastón

SABADELLFESTO DE ZAMENHOF KAJ TAGO DE
LA LIBRO EN ESPERANTO

La Zamenhof-festo komenciĝis en la Aŭditorio de la "Cámara Oficial de Comercio e Industria de Sabadell".

Post kelkaj vortoj, kiuj malfermis la feston, ekparolis S-ro L. Puig. En sia parolado li diris: "Ni hodiaŭ celebras omaĝon al Zamenhof, kaj tio okazas samtempe en la tuta mondo.

Ni devas precizigi la faktorojn, kiuj incitis la dekkvaraĝan knabon Zamenhof iniciati, tiel juna, rimedon enkonduki la pacon en la Mondon. Li ĝuste iniciatis tion pro la cirkonstancoj, troviĝantaj tiam en lia vilaĝo, loĝata de diversaj gentoj senĉese disputantaj sovaĝe. Li pensis pri io, kapabla pacigi ĉiujn, li pensis pri la eblaj multnombraj solvoj de interkompreniĝo kaj la sola rimedo, kiun li trovis adekvata estis la lingva interkompreniĝo. Kaj, kio povas pacigi lian vilaĝon tio ankaŭ kiel lingvo internacia povas pacigi la Mondon.

Al tiuj faktoj ni ŝuldas la lingvon Esperanto. Oni ĝin ŝuldas al persista junulo, kiu ĝis la dudekjara aĝo silente laboradis por krei lingvon internacian; plibonigon post plibonigo, tradukante el diversaj lingvoj ĝis li prosperis, ke la lingvo kreata estu taŭga.

Antaŭ kaj post la apero de Esperanto oni kreis aliajn lingvojn nome internaciajn, sed estas fakto, ke neniu alia lingvo progresis krom Esperanto. La kaŭzo estas, ke Zamenhof havis grandajn psikologiajn talentojn kaj disciplinon kaj ilin aplikis ankaŭ en la prilaborado de la lingvo internacia. Li havis demokratian senton kaj gravan penson, ke la lingvo internacia estu por ĉiuj. Li mem diris, ke li kreis nur la kernon de la lingvo aŭ fundamenton kaj ke la tuta homaro devas ĝin progresigi. Tio savis la lingvon. Pro la demokrato, la lingvo progresis. Li diris: "Mi ne volas esti kreinto de l' lingvo, mi volas nur esti iniciatoro". Jen mirakla deklaro.

La lingvon proponatan, li diris, mi forlasas al la respondeco de la tuta mondo, nur kompetenta akademio ĝin kontrolu. Pro tia demokrateco la lingvo prosperis.

Se oni demandas al iu komencanto,

kion li opinias pri la celo de Esperanto, li respondas, ke Esperanto estas la rimedo por faciligi la interkompreniĝon inter la homoj. Sed mankas diri ion, mankas diri, ke esperantismo estas homaranisma sento. Sciu, ke Esperanto estas homligilo super ĉiuj tendencoj, ĉu politikaj, ĉu religiaj, tio estas homamo, homaranismo.

En sia parolado de la unua Kongreso Universala de Esperanto en Bulonjo-sur-Mar, jen kion Zamenhof diris homarane: "Ĉi tie kunvenas ne francoj kun angloj, nek rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj. Benata estu la tago".

Tian sencon de homaranismo li donis al la lingvo. Estas kurioza afero, ke tiuj principoj de homaranismo ne estis utopioj. La principoj de la deklaro de la ONU pri la Homaj Rajtoj estas homaranismaj principoj, kaj pri religio oni konstatas identan tendencon; ĉiuj religioj evoluas al eklektismo. La Interna Ideo de Esperanto estas aktuala.

Ĝis venontjare!

Sekve S-ro Juan Sala disdonis la esperantajn librojn de RELA.

Hora infangrupo gvidata de fraŭlino Magda Clerch kantis du kanzonojn en Esperanto. Estas menciinde, ke la infanoj scias kanti nur en Esperanto, ĉar ili ne scias muzikon nek kantas en la gepatra lingvo.

Knabino tuj deklamis la verkon: "La Mensogema Paŝtisto".

La junula grupo JES, Sekcio de Centro de Esperanto Sabadell, prezentis kelkajn skeĉojn.

S-ro Sebastián Ribes prezentis kaj komentis diapozitivojn pri la 59^a Kongreso de Esperanto. Belajn bildojn de la veturado tra Svisujo kaj de la urboj Prago, Nurembergo, kaj la okazaĵoj en la kongresurbo Hamburgo. Sekvis la skeĉo "Banano sur la Orelo".

La junula Grupo Esperantista de Sabadell prezentis humorajn "Ĉinajn Ombrojn" kaj la Infana Grupo kantis Esperantlingve du katalunajn kanzonojn, ĉar kiel dirite, ili scias kanti nur en Esperanto.

S-ro L. Puig legis la rezultojn de la konkursoj organizitaj de "Fundación ESPERANTO" kaj donis la premion al S-ro Vicente Hernández Llusera, kiu gajnis la duan premion de ĝia Literatura Konkurso.



S-ro. L. Puig, Prezidanto de la Centro Esperanto Sabadell donas la premion de la Literatura Konkurso de Fundación Esperanto al S-ro Vicente Hernández Llusera.

Fininte la programon en tiu salono, ni iris al la ejo de Centro de Esperanto Sabadell, kie estis inaŭgurata la nova sekretario.

Frateca kunmangado en konata restoracio fermis la nunjaran Zamenhof-feston.

Sukcese antaŭen, ĝis venontjare.

G. M.

VALENCIA

LA ZAMENHOF-TAGO EN VALENCIA

La Valencia Grupo de Esperanto celebris, kiel kutime, la feston de Esperanto per la jenaj faroj:

La dektrian de Decembro oni klariĝis al la lernantoj de la klaso de Esperanto la signifon de la elpenso de la internacia lingvo, kaj kelkajn trajtojn de la vivo de Dro. Zamenhof. Poste s-ano Jozefo Soler projekciis kelkajn kolorajn filmojn pri diversaj kongresoj de Esperanto, kaj ĝi pruvis la taŭgecon de Esperanto por internaciaj kunvenoj.

La dekkvaran, kuniĝis en frata vespermangado pli ol sesdeko da gesamideanoj, kiuj, tiuokaze, samtempe omaĝis s-anon Johano Bosch, pro liaj elstaraj meritoj: helpado al samideano en malagraba situacio dum malfacilaj tempoj, kaj redaktado de "Boletín", post la rezigno de Ludoviko Hernández, kio estis tikla tasko; tamen, li sukcesis!

Nefermita letero al Profesoro Lapenna estis legita kaj aprobita unuanime.

La Prezidanto de la Grupo, S-ro Johano Devís, kaptis la atenton de la ĉeestantaro, kaj, je la fino de sia parolado, li donacis al omaĝito belan, arĝentan platon, dediĉitan de la valencia esperantistaro. S-ano Bosch dankis emociita kaj promesis laboradi plu por Esperanto.

Ankaŭ salutis s-ano Arnau, nome de la chestanoj; reprezentanto de la novaj lernantoj kaj la fileto de s-ano Canet, nome de la alikantaj esperantistoj.

La dekkvinan, multaj samideanoj ĉeestis ĉe la Meso, celebrita memore de la forpasintaj esperantistoj, kaj, speciale, de la ĵus malaperinta pastro J. López, nia kara kuncivitano.

Tuj poste, multnombra grupo sin turnis al la strato Dro. Zamenhof kaj surmetis laŭrokronon sur la nomtabulo de la Majstro. Kiel kutime, oni kantis "La Esperon". Laŭtradicie, en la tombejo, oni surmetis laŭrobranĉon sur la tomboj de konataj esperantistoj, kiuj plejparte, deziris ke verda kvinpinta stelo atestu pri ilia ĝismorta esperantisteco.

VALLADOLID

LA ZAMENHOFA FESTO EN VALLADOLID

Cijare la Valladolid-a Esperanto Grupo "Fido kaj Espero" dum tri sekvaj tagoj celebris la 115-an naskiĝdatrevenon de la kreinto de la Internacia Lingvo Esperanto Dro. L. L. Zamenhof.

La 13-an je la 8-a vespere la Prezidanto de la Grupo S-ro G. Castañón, prelegis esperante pri la temo "ZAMENHOF kaj ESPERANTO". La preleganto, tre bone dokumentita, parolinte pri la naskiĝo de Dro. Zamenhof en la pola urbo Byalistock, rakontis pri la lingvaj problemoj tie ekzistantaj kaj la rezultaj kvereloj kiujn Zamenhof mem spertis. Tio estas la kaŭzo kuragiĝinta Dron. Zamenhof krei Internacian Lingvon, sed ĝi ne estis tiel simpla afero. Li rakontis pri la entuziasmo de Zamenhof por krei Internacian Lingvon, sed ankaŭ pri la obstakloj kiujn li devis venki; sed fine de la jaro 1887^a aperis ruse la unua lernolibro pri Internacia Lingvo subskribita de Dro. Zamenhof per la kaŝnomo Dro. Esperanto. Baldaŭ aperis lernoli-

broj en aliaj lingvoj kaj en 1.891 aperis la Unua Adresaro enhavanta adresojn de la tuta Eŭropo. En 1.905 pli ol 800 personoj kunvenis en la franca urbo Boulogne-sur-Mer por ĉeesti la historian eventon: Unua Universala Kongreso. Tie por la unua fojo, viroj kaj virinoj el la plej diversaj patrinaj lingvoj interparolis kaj interkompreniĝis per la simpla internacia lingvo. Tondra aplaŭdado de la ĉeestantaro premiis la interesan prelegon de la Grup-prezidanto. Sekve S-ro. Castañón, hispane, parolis por klarigi la signifon de la emblemo de Esperanto, kiu estis tuj disdonata al la gelernantoj de la Elementa Kurso kaj kuragiĝis ilin surporti la emblemon kun ĝojo. S-ro. López Nalda, profesoro de la Elementa Kurso, disdonis la emblemon al la gelernantoj.



S-ro López Nalda metas Esperanto-insignon al nova esperantistino.

Sekve oni projekciis tre interesan filmon pri la lastaj esperantaj eventoj en kiuj partoprenis valladolidanoj. La filmo, kiun projekciis ĝia aŭtoro Angel Díez, plaĉis multege. Fine la multnombra ĉeestantaro iris al apuda salono kie en amikeca etoso tostis por la fina venko de Esperanto.

La 14-an je la sama horo kaj en sama loko kiel la pasinta tago, prelegis pri "Esperanto kaj la Internaciaj Kongresoj" S-ro. M. Cantalapiedra. La prelegonton prezentis la Prezidanto de la Grupo per mallonga, sed trafa paroladeto.

S-ro. Cantalapiedra parolis hispane kaj inter alie li parolis pri la fakto ke kiam Esperanto aperis, estis en sia apogeo la internacia lingvo Volapük apogata de individuoj kaj naciestroj, sed kiam Esperanto aperis, tiu ĉi nova lingvo sukcesis super la aliaj. Poste S-ro. Cantalapiedra klarigis ke Espe-

ranto ne estis farita kiel lingvo jam perfekta, sed kiel fundamento por formi poste veran lingvon. Li parolis, ankaŭ, pri la Unua Internacia Kongreso de Esperanto kiel praktika pruvo de interparolado en la nova lingvo. Fine li diris ke malgraŭ la malfacilaĵoj Esperanto daŭras plu kaj "post la historia fakto de la Unua Internacia Kongreso, oni celebras ĉiujare Kongresojn en diversaj landoj, efikantaj kiel frapado sur la pordo de la indiferenteco de la estraroj kaj de la internaciaj organizaĵoj". Li finis dezirante ke ĉiam la unueco de Esperanto iru antaŭen. Je la fino de sia disertacio S-ro. Cantalapiedra estis premiita per longa aplaŭdado.

Sekve S-ino M.^a Rafaela Urueña, Sekretariino de la Grupo, legis la verdiktojn de la Konkursoj "Fundación ESPERANTO".

Fine inter la ĉeestantaro estis lotumitaj libroj en Esperanto.

La 15-an, je la 13-a horo, Pastro Jonás Castro celebris, en Esperanto, meson en la Kapelo de la Altkolegio "La Salle". La biblian temon kaj la epistolon legis en la internacia lingvo F-ino Tina Tranque kaj S-ro. Luis Hernández.

La ĉjaraj aranĝoj finiĝis per frata bankedo en centra restoracio de la urbo.

L. Hernández

VIGO

ESPERANTO-EKSPOZICIO EN LA TAGO DE ZAMENHOF

Kun granda entuziasmo, la esperantistoj de Vigo digne festis la 115-an datrevenon de la naskiĝo de Dro. Zamenhof, per diversaj aranĝoj.

Sabaton, la 14-an de decembro oni inaŭguris Esperanto-ekspozicion en la Reĝa Salono de "Centro Mercantil" de Vigo.

La saman tagon, je la 8-a vespere, la prezidanto de H.E.F., S-ro Angel Figuerola Auque prelegis en hispana lingvo pri "Posición del Esperanto entre los inventos sociales de nuestro tiempo y personalidad de su creador". La multnombra publiko, kiu plenigis la salondon varme aplaŭdis je la fino. Tuj sekve, nia Prezidanto donis al S-ro Camilo Veiga Prego la diplomon kiu atestas la decidon de la Hispana Esperanto-Federacio: nomi al S-ro Veiga Prego ĝian honoran membron. Per

Angulo de la Esperanto Ekspozicio.



kortuŝaj vortoj, S-ro Veiga Prego dankis la decidon de la hispana esperantistaro. Entuziasmaj aplaŭdoj metis finan punkton al la aranĝo.

La 15-an de decembro, Tago de Zamenhof, 42 portugaliaj gesamideanoj partoprenis la feston, inter ili 15 geknaboj de la Curso de Foz do Douro, invititaj de la Grupo "Paco kaj Amo" de Vigo. Vizitinte la Esperanto-Ekspozicion, la membroj de la Grupo "Paco kaj Amo" montris la urbon al siaj gastoj, kunvenante ĉiuj en "Círculo Mercantil" kie la ĝenerala publiko, tie kolektiĝinta povis konstati la praktikan valoron de la Internacia Lingvo.

La ekspozicio daŭris ĝis la 19-a de decembro kaj ĝi estis tre vizitata.

La ĵurnalo kaj Radio Vigo daŭre raportis pri la festo.

ZARAGOZA

Kiel ĉiujare la esperantistoj de Zaragoza memorfestis la datrevenon de la naskiĝo de Dro. Zamenhof.

La 13-an, Radio Zaragoza disaŭdigis Esperanto-programon. En ĝi la konata radio-parolisto "Gustavo-Adolfo" bele glosis la signifon de la festo kaj sekve li prezentis diversajn faktojn rilatan-tajn al la vivo de Esperanto en nia urbo. La programo finiĝis per la kanto de "Esperanto la lingvo por ni".

La 14-an, je la 10-a vespere, pluraj gesamideanoj kunvenis en centra restoracio por partopreni en frata bandedo.

La 15-an vespere devus okazi kunveno en la Klubo "Frateco", sed pro la forpaso de nia samideano José Guío, ne okazis tiu aranĝo.

H. E. J. S. - TENDARO

Okazonta en Zaragoza de la 27-a ĝis la 30-a de marto 1975

La Hispana Esperanta Junulara Sekcio (H.E.J.S.) decidis okazigi junularan renkontiĝon, por pristudi la laboron realigitan kaj realigotan.

La renkontiĝo okazos en Zaragoza.

En venonta numero de BOLETIN kaj en la bulteno de H.E.J.S. ni informos pri la programo kaj kondiĉoj.

Konstanta adreso: H.E.J.S., Junulara Sekcio de Hispana Esperanto-Federacio, str. Barrencalle Barrena, 7, 1.º, BILBAO-5.

VIVO DE LA GRUPOJ

CALLOSA DE SEGURA

Grupo de aktivaj samideanoj de Callosa de Segura (Alicante) organizis kaj realigas tre interesan kampanjon por disvastigi Esperanton. Sekve de tiu kampanjo, en la monato oktobro, oni komencis kurson de la Internacia Lingvo, por geinfanoj en la Nacia Lernejo "Primo de Rivera"; la infanoj apartenas al la 6^a, 7^a kaj 8^a kursoj; la gelernantoj estas dividitaj en tri grupoj (la nombro de lernantoj estas 70) kaj la lecionoj okazas ĉiusemajne, mardon, jaŭdon kaj vendredon. Gvidas la kursojn S-ro Antonio Calvo Guillén helpate de nia samideano S-ro Bernabeu Franco.

La klaso de Esperanto ne estas deviga, sed ĉiutage, la intereso por la Internacia Lingvo kreskas en la infanoj, kiuj jam inter si sufiĉe babilas en Esperanto.

Krom la kurso por geinfanoj, ĉiusabate, de la 7^a ĝis la 9^a vespere okazas kurso de Esperanto por plenkreskuloj, gvidata de S-ro Francisco Zaragoza Ruiz; partoprenas tiun kurson 25 gelernantoj kiujn oni interesigas ne nur pri la lingvo, sed ankaŭ pri la interna ideo, por ke ili, samtempe, parolu kaj sentu la lingvon.

Plie, oni devis komenci kurson per korespondado pro peto de pluraj simpatiantoj en diversaj cirkaŭantaj urbetoj kaj vilaĝoj.

La esperantistoj en tiu bela urbo kunvenas ĉiun dimanĉon kaj festotagon en kafejo "Brasil", kie ili akceptas landajn kaj eksterlandajn vizitantojn en esperantista medio.

La senlaca laboro de niaj samideanoj de Callosa de Segura bone fruktiĝas kaj ni esperas de ili gravajn sukcesojn en baldaŭa estonto.

GIJON



Niaj samideanoj de
Gijón pozas kun
Pastro Irala.

La 1-an de Novembro je la 12-a horo matene, la Grupo Esperantista "Jovellanos" kunvenis okaze de vizito al nia sidejo, de samideano kaj eminenta misiisto, Pastro Narciso Irala, S. J.

Li parolis pri siaj personaj impresoj dum sia misio en Ĉinujo, kiu daŭris 19 jarojn, kaj siaj spertoj kiel Esperantisto en Ĉinujo kaj Brazilo.

Li parolis ankaŭ pri siaj vojaĝoj kaj sia laboro kiel kuracisto per psikoterapio, oni lin nomas "Misiisto de la Feliĉo" kaj lia devizo estas; "Per la Feliĉo al Saneco".

Li opinias jene: "Pli ol 60 % el la malsanoj estas spiritaj, ne fizikaj, kaj la kaŭzoj de tiuj ĉi malsanoj estas; la kolero, la eksceso, la ĉagrenoj, la timo, la zorgoj, la malgajeco ktp; ni forigu tiujn ĉi malsanojn de nia spirito, kaj tuj, nia organismo funkcios bone kaj ni estos feliĉaj".

Vere ni pasigis agrablan kunsidon kune kun nia samideano, Pastro Irala.

Fine, ni omaĝis nian samideanon per honora vino.

S. Mulas

Dum la lasta Generala Kunveno de la Esperantista Grupo de Valencia, estis elektita jena Estraro:

Prezidanto: S-ro Johano Devís Calpe. Sekretario: S-ro Francisko Marco Máñez. Kasisto: S-ro Jozefo Pérez Catalá. Bibliotekisto: S-ro Jozefo Soler Sempere. Del. Radio: S-ino Mikaelino Malón Fenero. Voĉdonantoj: S-roj Rafaelo Herrero Arroyo, Santiago Miquel Planas, Felikso Navarro Clemente, Jozefo Seguer García, Domeniko Domenech Savall kaj Emiljo Verdú Ferrandis.

ATENCION

La Junta General de la Federación Española de Esperanto, celebrada el día 22 de julio de 1974, en Valladolid, acordó elevar las cuotas de miembro de la Federación en sus distintas categorías, habiendo quedado fijadas como sigue:

Miembro abonado, 250 pesetas; Miembro protector, 400 pesetas; Miembro numerario, 100 pesetas. Estas cotizaciones son anuales.

El miembro vitalicio seguirá cotizando 5.000 pesetas en una sola aportación.

En el número de BOLETIN (septiembre-octubre 1974), fueron publicados los acuerdos de la Junta General, pero como sin duda no todos los federados los leyeron, ruego a todos los miembros de la Federación tengan en cuenta el acuerdo de elevación de las cuotas al hacer el pago de las mismas.

NI GRATULAS

Duoblan gratulon al nia samideano José M.^a Galofré Domingo, de Sabadell, kiu koincide kun la naskiĝo de sia unua filo publikigis sian unuan libron de poemoj en hispana lingvo.

La prezentado de la libro okazis la saman tagon kiam ili festis la bapton de sia filo Ivan.

La loka ĵurnalo tre favore raportis pri la libro de nia samideano. Denove, koran gratulon.

Ankaŭ ni kore gratulas niajn samideanojn, geedzojn Zadravec-Ferrer Hervás, li jugoslavo, ŝi hispanino, pro la naskiĝo de ilia unua filino, Elisa, kiu tutcerte en baldaŭa estonto estos aktiva membrino en niaj vicoj.

ESPERANTO EN LA FILATELIA

En el programa de la XVI Exposición Filatélica, Grupo de Empresa SEAT E. y D., aparece bajo el título "El Esperanto como tema filatélico" un artículo de Evaristo Gil Pallarés, de Barcelona, ilustrado por matasellos especiales de diversos Congresos de Esperanto, celebrados en España.

Es interesante la labor que realiza nuestro compañero Evaristo Gil Pallarés en el campo de la filatelia. Nuestra felicitación.

ATENTU

En la monato junio, en el dono de Hispana Esperanto-Federacio, aperis nova dokumento de CED en hispana lingvo. Ĉifoje temas pri la Dok. CED, A/II/I

"El problema lingüístico en las relaciones internacionales"

Aŭtoro de la dokumento estas Profesoro Dro. Ivo Lapenna. Originala titolo en Esperanto, "La lingva problemo en la internaciaj rilatoj". Trad. Inés Gastón. Broŝuro 36-paĝa, 22 × 15 cm. Prezo 15 pesetoj.

Nura distribuanto: Eldona Fako de H.E.F., ĉe Inés Gastón, P.^o Marina Moreno, 35, 4.^o dcha. ZARAGOZA (Hispanujo).

Specialaj rabatoj laŭ la kvanto mendita.

MAURICE MONGEOIS

Kun profunda malĝojo, mi sciigas al vi, ke fine de Septembro forpasis preskaŭ subite, pro cerba kongesto, en la aĝo 67 jaroj, nia bona amiko Maurice Mongeois.

Li partoprenis kelkajn hispanajn kongresojn, kaj certe multaj hispanaj esperantistoj memoras pri li.

Li estis esperantisto de antaŭ kvardek jaroj, kaj Prezidanto de la Esperanto-Grupo en Epernay.

Ni estas tute certaj, ke en Esperantujo, la sciigo pri lia morto trovos doloran eĥon, speciale en tiuj, kiuj havis la ŝancon koni persone lin.

Pacan ripozon por li!

Volonte mi aperigas la ĉi-supran tristan informon, s-ano Mongeois ĝuis la simpatiecon de la hispanaj esperantistoj; li estis nia bona amiko.

Por lia familio kaj speciale por la Esperanto-Grupo en Epernay, nian sinceran kondolencon.

P. JOZEFO LOPEZ GOZALBEZ

Post longa kaj suferiga malsano mortis en Valencia, la dekunuan de pasinta Novembro Patro Jozefo López Gozábez, iama estro de la franciskana monaĥejo de Alcoy, Cullera kaj Valencia.

Li estis eminenta teologo kaj lingvisto, ĉar li majstris, krom kastila kaj valencia, latinan, portugalan, italan, germanan, francan kaj anglan lingvojn. Li estis fervora esperantisto; okaze de meso dum la esperantistaj solenaĵoj li predikis en Esperanto kaj liaj oratoraĵoj estis tre ŝatataj de la fideluloj.

Li estis grandanima. Okaze de la enterigo de samideano kiu deziris esti civile enterigita, li ne hezitis prezidi la akompanantaron. Li klarigis: "Li estis bonegulo kaj nur Dio povas decidi pri lia fina sorto!". Tiel, monaĥestro prezidis civilan enterigon, kuraĝante endanĝerigi sin, en epoko kiam oni ne allasis detalojn.

Li lasas neanstataŭigeblan malplenon en la vicoj de la valencia samideanaro. Ke li pace ripozu!

JOSE GUIO FIERRO

Post longedaŭra malsano, la 15-an de decembro, en sia 57 jaraĝo, forpasis en Zaragoza nia samideano José Guío Fierro.

Fervora esperantisto, entuziasma federaciiano kaj aktiva membro de "Frateco", li multe laboris en la disvastigo de Esperanto kaj klarigis plurajn kursojn de la Internacia Lingvo, same en nia societo kiel en la vegetarana asocio.

Pro sia sindonemo kaj afabla karaktero, li ĝuis la simpatiecon kaj amikecon de ĉiuj personoj konantaj lin; simpatio kaj amikeco, kiuj manifestiĝis dum la enteriga ceremonio.

Ke li pace ripozu!

Por lia familio kaj por la Societo "Frateco", kiu perdis unu el siaj plej aktivaj membroj, nian sinceran kondolencon.

LUTO EN LOS ESPERANTISTAS ASTURIANOS

CANDIDO CIENFUEGOS

Sí, es cierto. Los esperantistas asturianos estamos de luto.

Cándido Cienfuegos, que allá por los años veinte había iniciado sus conocimientos acerca del Esperanto, vio en él un motivo eficaz para la buena comprensión de los pueblos, si estos se decidían a su aprendizaje. Pero para ello era necesario propagarlo a los cuatro vientos. Había que preparar a la juventud para un próximo futuro, para acortar distancias lingüísticas y hacer progresar la esperanzadora amistad entre todos los seres humanos, que eso era lo que precisamente deseaba el autor del Esperanto.

Cándido Cienfuegos, consigue que algunos amigos se le sumen en sus pro-

pósitos, y llega a crear un Grupo Esperantista en el GRUPO DE EMPRESA DE FABRICA DE MIERES.

Después de unos meses de actividad, este Grupo por incomprensibles causas, desaparece. No hay cabida en FABRICA DE MIERES.

No se desanima Cándido Cienfuegos, y el Grupo es llevado a EDUCACION Y DESCANSO, donde se le acoge como una faceta más en pro de la cultura. Fue allí donde prosperó más la afición, ya que concurría a las clases un buen número de alumnos, donde como premio a sus progresos en el Esperanto, Cándido Cienfuegos obsequiaba a los alumnos que tuvieran carta del extranjero por primera vez, con una insignia esperantista que se les imponía en un acto preparado para ello. Tal era su pasión por el Esperanto que no le importaba ningún sacrificio con tal de poder propagar su ideal esperantista.

A continuación comenzó otro Curso en los locales de Falange donde también asistían muchos y muy buenos alumnos. Por último empezaron Cursos en los locales del Polideportivo (Casa de la Juventud), lugar donde se celebraron varias reuniones anuales de los Esperantistas Asturianos.

Con sus trabajos y tesón, logró que se llevara a efecto la celebración en Mieres del XXX CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO. La fatalidad para todos fue la gravísima enfermedad que le retuvo en cama desde unos meses antes de la celebración del Congreso hasta bastantes días después de su clausura. Fue para él una ilusión frustrada no poder estar presente en los actos del mismo, por cuya celebración él tanto había trabajado.

Aquí debemos expresar nuestra gratitud al entonces Alcalde de Mieres, D. Guillermo Lorenzo, que se entregó de lleno para que el Congreso no defraudara a nadie, como así ocurrió, constituyendo su celebración como un homenaje a Cándido Cienfuegos. Creo que todos lo hayan visto como un premio a su tesón y fructífera labor.

Una vez curado —parcialmente—, nuestro amigo sigue en la brecha y ahora no sólo en Mieres, sino que se traslada a Avilés y consigue dar un curso que se repite al año siguiente, en el GRUPO DE EMPRESA DE ENSIDESA. No descansa y da otro a los ferroviarios de Ujo y a continuación en el TELE-CLUB de esta localidad donde arraiga bien y se crea un Grupo de Esperanto.

Este hombre intensifica su labor en la difusión de la Lengua Internacional, de tal forma que intenta comenzar otro curso en Turón y otro en Murias, localidades de Mieres, pero la fatalidad también en esta ocasión parece perseguirle, pues es víctima de una parálisis que le inmoviliza medio cuerpo, enfermedad de la que se fue recuperando muy lentamente. Así y todo, asiste a los Congresos Nacionales, Alicante, Vigo, Madrid, Valladolid..., pero Cienfuegos ya caminaba mal, pues las enfermedades le agotaron. El es todavía joven y solo vive para el Esperanto. Deseaba asistir al Congreso de Lérida para lo cual ya estaba haciendo proyectos.

Finalmente tuvo que trasladarse a Gijón con su hijo. La marcha de Mieres fue muy sentida por él, dado que en este lugar dejaba a sus colaboradores de siempre y en Gijón se iba a encontrar solo en sus tareas de difusión. No obstante logró el pasado año explicar un Curso de Esperanto en Pumarín con un buen plantel de alumnos, algunos de los cuales asistieron por primera vez a un Congreso, en Valladolid.

Era tal el entusiasmo que sentía por el Esperanto que su conversación siempre giraba sobre el mismo tema. Como jubilado que era, podía haber solicitado el traslado de sus haberes a Gijón; pero no, él quería venir a Mieres para hablar y cambiar impresiones con los amigos que dejaba aquí; con los que él consideraba verdaderos amigos, aunque para él eran amigos todos los esperantistas.

El día 28 de diciembre a las cuatro de la madrugada, en Gijón, dejaba de existir Cándido Cienfuegos, al que llamábamos los amigos "Cent-fajroj".

Los restos mortales de Cándido Cienfuegos han sido traídos a Mieres, su pueblo natal, y nosotros, sus amigos entrañables, nos hemos enterado de la fatal noticia, dos horas antes de su llegada a Mieres. Por tal motivo, pocos esperantistas hemos podido acudir a rendir el último tributo de amistad al que fue un fiel amigo y gran paladín del esperantismo en Asturias.

¡Cándido Cienfuegos! que Dios te acoja en su seno y que tu estrella verde, símbolo de tu esperantismo aprendido en la obra del Dr. Zamenhof, sirva de guía a todos aquellos que fueron tus alumnos.

Silvestre Manuel Ardura

Inter la artikoloj laste aperintaj en la Esperanta gazetaro elstaras *Por ke estu tute klare*, publikigita en ESPERANTO, n.º 827, novembro 1974, kaj verkita de ties redaktoro. Ĝi estas alia brila modelo de la "novdemokratia, liberala ĵurnalismo" nun praktikata ankaŭ en la organo de UEA.

Ie, en ĉi tiu sama numero de BOLETIN, d-ro Ivo Lapenna analizas la artikolon de sia persona vidpunkto, sed mi deziras de mia flanko altiri la atenton de la legantoj al kelkaj aspektoj ne tuŝitaj de la eks-prezidanto de UEA.

Por ke estu klare inkluzivas la demisian leteron de prof. Juan Régulo kaj la jenan komenton de la redaktoro: *La aperigo de la letero de prof. Régulo neniel signifas, ke ni iel ajn aliĝas al la enhavo de tiu letero, kiun ni trovas bazita sur aprioraĵoj kaj antaŭjuĝoj.*

Tiel oni skribas la historion! Kial, sinjoro redaktoro, vi ne reportis al viaj legantoj, ke vi, kaj aliaj en gvidaj postenoj en UEA, ĉiamaniere petegis, repe- tegis, flatis kaj kajolis profesoron Régulo, ke li retiru sian UNUAN demisian leteron? Prof. Régulo, certe sub la impresoj, ke li evitas damaĝon al la ĝenerala Esperanto-movado, cedis al viaj premoj, petoj kaj flatoj, sendis alian demision —pli konforman al viaj deziroj, sed ne al liaj principoj— kaj tiam vi pagis lian bonvolon kaj lian sanan intencon, deklarante, ke lia demisia letero baziĝas sur aprioraĵoj kaj antaŭjuĝoj! Mi ne scias, kiel prof. Régulo reagos ĉe via absolute sentakta kaj senkonsidera komento, sed espereble li scios rebati tiel basan frapon al sia konsekvenca esperantismo. La esperantistoj rajtas scii la veron kaŝitan sub la publikigita demisia letero de prof. Régulo kaj la rolon luditan en ĉi tiu afero de la sinjoro redaktoro mem, ĉe kies lipoj la finaj vortoj de lia artikolo: *Ankaŭ en la Esperanto-movado oni rajtas atendi iom pli de tiu kondutmaniero, kiun oni postulas de la sportistoj, senrigarde ĉu ili venkas aŭ malvenkas*, montras speciale groteskan humoron aŭ dik-haŭtan cinikecon.

La sinjoro redaktoro de ESPERANTO kun tono spitea kaj aroganta (klara simptomo de baza nesekureco kaj de intima ŝanceliĝo) aldonas: *Tio ĉi ne estas revuo kies ĉefa tasko estas kontentigadi la ofenditajn dignojn de la eksaj funkciuloj de UEA.* Per tiaj vortoj, la sinjoro redaktoro klopodas krediĝi al la naivaj legantoj, ke la post-hamburga krizo eksplodis pro *personaj* motivoj, eĉ se li scias tre bone, ke la krizo fontas de *principaj* premisoj kaj de *ideologiaj* diverĝoj, kaj ke la personoj havas nur tre akcesoran gravon. Ĉu pro ofendita digno de eksaj funkciuloj eksiĝis simplaj membroj kaj tutaj organizaĵoj?

La sinjoro redaktoro diras poste: *Fine, por ke oni ĉesu spekulacii (tiel!) tiurilate, necesas konfesi, ke la hamburgaj eventoj rezultigis apenaŭ 5 eksigojn el la membreco (tiel!) de UEA, kun klara indiko de la hamburgaj ŝanĝoj kiel motivo.* Ĉu la sinjoro redaktoro parolos iam pri la eksigoj sen klara indiko, aŭ tute sen indiko, kiuj ŝuldiĝas al la hamburga puĉo, kiel li tre bone scias?

La sinjoro redaktoro daŭrigas: *En la realo, ekzistas financa krizo de UEA, dum la t. n. organiza krizo ekzistas nur en la kapoj de tiuj, kiuj la Asocion —ĉar ĝi ne plu estas gvidata de ili— volonte vidus disfalanta kaj malinte-griganta.*

Pri tio, ĉu la organiza krizo ekzistas aŭ ne, kelke da signifaj komunikoj kaj decidoj diverslandaj aperas en ĉi tiu numero de BOLETIN. Kaj aliaj sekvos, pro la simpla kialo, ke la nuna estraro de UEA reprezentas nek la opiniojn nek la konvinkojn de la granda plimulto de la membroj, kiuj ribelas kontraŭ la altrudiĝo de diktatoreca kaj arbitra minoritato, tre kompetenta en postkulisaj manovroj kaj en kovado de intrigoj kaj koluzioj, sed absolute nekapabla fari ian konstruan laboron, kaŭze de siaj internaj kontraŭdiroj kaj de sia politika submetiteco al la disciplino de antineŭtrala ideologio.

Kaj eble estas tempo, ke la sanaj elementoj en la Esperanto-movado komencu jam pensi pri la neceso starigi novan Asocion kun plenaj garantioj kontraŭ la intrigoj de senskrupulaj karieristoj kaj kontraŭ la manovroj de politikaj zelotoj de ajna koloro.

Rilate al du specifaj punktoj en *La revuo de la revuoj* de la lasta numero de BOLETIN, d-ro Ivo Lapenna faris la jenajn precizigojn, kiujn ni volonte aperigas:

«1. La unua rilatas al komentoj de s-ro De Diego pri la nuna kaj antaŭa estrarano pri financoj. Ne nur, ke la ĉefa respondeculo ne donis «alarmon pri la malbona financa situacio de UEA», sed, multe pli, mi estis rekte misgvidata dum la tuta jaro 1973 pri la financa situacio. Plurfoje mi demandis la direktoron pri la stato de la financoj de UEA, kaj mi ĉiam ricevis respondon, ke verŝajne estos ia malgranda defcito, sed certe ne pli signifa. Eĉ en sia ciklerulo de 01.11.1973 al mi, kun kopio al aliaj tiaj estraranoj, la direktoro asertis, ke la enoficigo de 2 pliaj geoficistoj povos okazi «sen grandaj timoj el financa vidpunkto». Tio evidente rilatis al la jaro 1974, kiu denove montros grandan defciton, dum rilate la jaron 1973 la defcito plian fojon eĉ ne estis menciita. Mi eksciis pri la defcito nur la nokton antaŭ la aprila kunsido de la estrarano en 1974 kaj, kompreneble, estis ŝokita ne nur pro la alteco de la defcito de 60.000 gld., sed ankaŭ pro la fakto, ke la alarmo ne estis donita almenaŭ unu jaron antaŭe. Pri tio evidente kulpas la estrarano pri financoj, parte ankaŭ la direktoro de la CO. Mi ankoraŭ aldonu, ke la estrarano pri financoj forlasis la kunsidon de la estraro tuj en la komenco, tial, ĉar la tiama estraro per plimulto de voĉoj malakceptis lian proponon, ke la estraro esprimu malkonfidon al la tiama vicprezidanto Prof. Popoviĉ pro la kontoj de UK en Beograd. La estrarano pri financoj ne nur neglektis la kontojn por 1973, sed ankaŭ ne prezentis buĝetproponon por 1974, tiel ke nur en Hamburgo la tiama estraro povis dum mallonga kunsido «pri-trakti» la aferon, fakte lasi ĉion en la manoj de la Komitato. En ligo kun tio mi deziras atentigi, ke HEROLDO kaj kelkaj aliaj disfamigas plian malveron pri la kvazaŭa «katastrofo» financa situacio de UEA. La fakto estas, ke, malgraŭ la defcito de 60.000 gld., la kapitala konto — kaj ĝi estas decida — malaltiĝis nur je 10.000 gld. Efektive, la asocia kapitalo estis 50.000 gld. en 1948, dum fine de 1973 ĝi estis pli ol 265.000 gld. Se oni aldonas la veran valoron de la domo, ĝi eĉ estas multe pli granda.

2. Due, s-ro De Diego citas el la bulteno de d-ro A. Bormann (la patro de la vicprezidanto d-ro W. Bormann), laŭ kiu «publikigi kontraŭajn opiniojn en la UEA organo ne estis permesite». Verŝajne d-ro A. Bormann celas al la reagoj ricevataj post la aprila artikolo en la revuo «Esperanto». La fakto estas, ke mi petis la redaktoron en majo 1973 publikigi absolute ĉiujn negativajn reagojn (verŝajne estis deko da ili) kondiĉe ke li publikigu nur dekonon de ĉiuj pozitivaj reagoj kun fortaj apogoj al la tiama linio de UEA (en tiu tempo entute ĉ. 200, poste minimume 300). Kiel konate, la redaktoro rifuzis tion fari kaj ĉiuj «negativaj reagoj», kompreneble, estis publikigitaj en «Heroldo» dum la pozitivaj neniam estis publikigitaj. Do, precize inverse de tio, kion asertas la bulteno de d-ro A. Bormann. Cetere, se tiu aserto estus vera, la «kontraŭaj opinioj» ja povus abunde aperadi en la nuna «Esperanto». Kie ili estas? Eĉ ne serioza agadprogramo ekzistas.»

—oOo—

D-ro P. Denoël, estrarano de UEA sendis al la redakcio de BOLETIN la jenan leteron:

«La 14-an de decembro 1974. Al S-ino Inés Gastón, redaktorino de BOLETIN. Paseo Marina Moreno, 35, 4.º dcha. Zaragoza. Kopie al Hispana Esperanto-Federacio. — Estimata s-ino Gastón: Kun danko mi ricevis preskaŭ sinsekve (verŝajne pro la poŝta strikado en Francio) la n-ojn 69 kaj 70 de via revuo. — Permesu unue ke mi sincere gratulu vin pro la bela kaj plaĉa prezento de via «Boletín», klare redaktita kaj agrable ilustrita. — Bedaŭre mi ne povas konsenti pri la parto de la enhavo, ekskluzive direktita kontraŭ la nunaj estraro kaj komitato de UEA, kiuj estos la gvidado de la asocio dum la venontaj tri jaroj. De nun tiu gvidado estas ŝargita de la promociigo ekstera de la L.I., de la reprezentado de la movado antaŭ internaciaj instancoj, kaj krome — sed esence — de la restarigo de financa kaj administra bazoj de la asocio. — En viaj n-oj 69 kaj 70 (Revuo de la revuoj) vi citas unu frazon

el mia respondo al demando de «Heroldo de Esp.», tuj post la U. K. en Hamburg, nome «Polemikoj devos ĉesi», en kiu via kunlaboranto ŝajnas vidi iun vualitan minacon. — Laŭ tiu frazo, la ĉeso de la polemikoj estas la logika kondiĉo por restarigo de sana kaj efika kunlaborado inter ĉiuj, pri kiu mi ĵus parolis en la teksto. Cetere konfirmas tiun sencon de verbo «devas» la tuj sekvanta frazeto: «Vundoj devos refermiĝi». — La polemikoj —kiuj daŭras almenaŭ de aprilo 1974— normale ĉesos kaj la vundoj nature refermiĝos, kiam la pasia amodo naskiĝinta okaze de la 59-a U. K. fine kvietiĝos, kiam la pasia esperantistoj komprenos la vanecon de tiu interfrata batalo. Tiu senĉesa ripetado de samaj asertoj, supozoj kaj konjektoj, kaŭzas malkonfidan etoson en UEA, kiu riskas malfortigi la asocion, kaj estonte krei kromajn streĉojn de ĉiuj por garantii plenan vivkapablon de la sola neŭtrala esperanto-movado. Kun decido la nuna estraro rigardas al estonteco kaj ĝi ĉion faros, en finfine reveninta konkordo kaj en al ĉiuj necesa neŭtraleco, por antaŭeniri sur la vojo al la venko de Esperanto. — Via afableco certe ebligos, ke viaj legantoj vidos tiun ĉi leteron. Kun koraj salutoj kaj bondeziroj, sincere via, P. Denoël.»

Car d-ro Denoël aludas ĉi rubrikon, "Revuo de la revuoj", permesu, ke mi komentu lian leteron.

Nu, mi ne vidas ajnan minacon, vualitan aŭ ne, en lia frazo "Polemikoj devos ĉesi". Mi vidas nur la intencon, kaj la praktikadon, de la nuna estraro de UEA, ignori ĉian kritikon, ĉian nefavoran reason, ĉian kontraŭan opinionon, obeante tiel la principon de la novstalinisma dialektiko, ke problemoj, malkonsentoj —kaj eĉ personoj el karno kaj ostoj— tute ne ekzistas, se oni ne mencias ilin.

Kaj mi miras, ke, kiam laŭlonge de la jaroj oni senĉese artikolis, pamphletis, cirkuleris, versis, kaj eĉ anonime insultis kontraŭ la persono de d-ro Lapenna kiel reprezentanto de la sendependa neŭtraleco de UEA, d-ro Denoël ne pensis, nek proklamis, ke "polemikoj devos ĉesi".

Aliflanke, mi bedaŭras, ke d-ro Denoël forgesis klarigi kaj konkretigi en kio konsistas la senĉesa ripetado de supozoj kaj konjektoj, ĉar la fakto, ke UEA perdis sian sendependan kaj neŭtralan staton klaras kiel la taga lumo. Ĉu la nuna estraro de UEA kuraĝos oponi al la sugestoj, instrukcioj kaj ordonoj de k-do Aleksiev kaj ties grupo —la vera kaj efektiva gvida instanco de UEA— sen senti tuj la pezan efikon de ĝia kuratoreco?

Almenaŭ pri unu afero mi konsentas kun d-ro Denoël: vanas protesti kontraŭ tia situacio. La manoj nun vere direktantaj UEA-n havas pli ol sufiĉan forton, celkonscion kaj disciplinon por konstante reteni la Asocion... aŭ por detrui ĝin. Ni ne scias, d-ro Denoël, ĉu vi kunlaboris konscie aŭ nekonscie puŝi UEA-n al tiel bedaŭrinda sorto. Tamen ni dankas vin pro via letero kaj publikigas ĝin, kvankam la organo de UEA, de sia flanko, absolute rifuzas aperigi la protestojn de aliaj esperantistoj, tial, ke "polemikoj devos ĉesi", kaj tial, ke UEA forskuis de si la "diktatorecan reĝimon" de d-ro Lapenna kaj starigis en sia organo la liberecon de opinioj.

—oOo—

En NOV-ZELANDA ESPERANTISTO, n.º 377, 4-1974 ni legas: «*Eksterordinare grava anonco*. S-ro E. R. Dearnley, vicprezidanto de NZEA havas plezuron informi siajn multajn geamikojn, ke li fine finaĉiĝis. La geedziĝo okazos en New Plymouth en decembro 1974 aŭ januaro 1975».

Ni ĉiuj scias pri la ne tre granda entuziasmo kun kiu multaj viroj atendas sian nerevokeblan ŝanĝon al edza stato. Sed, ke s-ro E. R. Dearnley *finaĉiĝis*, ĉar edziĝonta en decembro aŭ januaro, ŝajnas troa malespero. Kaj la amuzega preseraro de NOV-ZELANDA ESPERANTISTO sendube estos abunde uzata de niaj ŝercistoj kaj humoristoj. Ĉu ne, amiko Beaucaire?

Serioztone jam, gratulojn al la novaj geedzoj, kaj aplaŭdojn al la preseja korbolo de NOV-ZELANDA ESPERANTISTO pro lia feliĉa inspiro.

Kaj ĝis la proksima revu-rikolto, kun plej koraj salutoj,

Fernando de Diego

VII^a FRANCA-HISPANA ESPERANTISTA RENKONTIĜO

9-10-11 Majo 1975

Cefa enirejo de la katedralo.



Denove la Franca-Hispana Esperantista Renkontiĝo okazos en nia lando; ĉijare en Huesca, ĉefurbo de la Aragona Pireneo.

Huesca, la "Urbs Victrix Osca" romana, estas urbo vizitenda de tiuj, kiuj ŝatas trankvilajn urbojn, kiuj kune kun siaj modernaj kvartaloj konservas sian antikvan parton kun elvokaj stratoj kaj placetoj. La katedralo, en alia tempo moskeo, estis aranĝita kiel katedralo en 1097. Je la fino de la XIII^a jarcento, dum la regado de Jaime la I^a, komenciĝis la konstruado de la nuntempa katedralo, kiu estis finita proksimume en la jaro 1500; ĝi estas de gotika stilo kvankam ĝi konservas arkitekturajn postsignojn de antaŭaj epokoj. Belega estas la ĉefaltaro, verko de Damián Forment. Ĝi estas el alabastro en kiu sin kombinas la gotika kaj la renesanca stiloj.

La Literatura Universitato, kiun fondis Pedro la IV^a, en la jaro 1354, estis konstruita sur la muzulmana "Zuda", tie ankoraŭ konserviĝas romanikaj postsignoj; la salono, kies tradicio ligiĝas al la legenda epizodo "Campana de Huesca" okazinta dum la regado de Ramiro la Monaĥo, kaj kiu estas unu el la altoaragonaj tradicioj.

La Hispana Turisma Esperanta Sekcio kiel respondeca organizanto de tiuj renkontiĝoj en Hispanujo, jam komencis la oportunajn paŝojn por ke la programo de la VII^a Franca-Hispana Es-

perantista Renkontiĝo estu inda ĉenero en la vico de tiuj internaciaj aranĝoj.

Vendredon, la 9-an de Majo, krom akcepto de la alvenantoj, okazos vespere, prelego pri Esperanto por la ĝenerala publiko. Verdire, tiaj prelegoj okazos ankaŭ laŭlonge de tiuj monatoj, ĝis la okazigo de la renkontiĝo, fare de esperantistoj de Zaragoza. Sabaton, la 10-an, matene ni vizitos la urbon kaj ties vidindaĵojn oni klarigos surloke en Esperanto; por tiu mateno estas antaŭvidita la Oficiala Akcepto en la Urbodomo. Posttagmeze okazos duontaga ekskurso, plej eble al Alquezar. Dimanĉon, kiel kutime okazos tuttaga ekskurso al Kastelo de Loarre.

Ankaŭ estas antaŭvidita folkloria regiona festo.

La organizadon kaj efektivigon de la aranĝoj prizorgas rekte la Hispana Turisma Esperanta Sekcio, kiu faciligos ĉiajn informojn al la interesatoj.

Ni jam rezervis loĝejon en Hotelo Pedro I^o. Tagmanĝoj kaj vespermanĝoj estos komunaj en diversaj restoracioj.

Mi ripetas kion mi jam diris en pasintaj okazoj. Kvankam ĉi tiuj sinsekvaj internaciaj renkontiĝoj estas organizitaj de francaj kaj hispanaj samideanoj, ankaŭ alilandaj esperantistoj estos bonvenaj. Ni esperas la partoprenon de ĉiuj samideanoj, kiuj dum tiuj tagoj ferios en Hispanujo.

HISPANA TURISMA ESPERANTA SEKCIO

Pluraj esperantistoj petis de ni la organizadon de komuna vojaĝo al Romo, dum la jaro 1975. Sekve, ni organizas ĝin koincide kun la IKUE-kongreso, okazonta en Romo de la 11-a ĝis la 16-a de aŭgusto 1975.

Principe, ni organizas vojaĝon de la 10-a ĝis la 20-a de aŭgusto, vizitante ankaŭ la italajn urbojn Florenco kaj Genovo.

Proksimuma prezo: 17.000 pesetoj.

Informas: H.T.E.S., ĉe I. Gastón, P.^o Marina Moreno, 35, 4.^o dcha. ZARAGOZA.

27^a IFEF-KONGRESO EN VILLACH (Aŭstrujo)

Okazonta de la 10-a ĝis la 16-a de Majo 1975

Kongreskotizo ĝis la 14^a de aprilo 1975:

Kongresano 320 ŝillings; Familianoj emeritaj samideanoj kaj junuloj ĝis 20 jaroj aĝaj, 160 ŝillings. Simbola aliĝo 60 ŝillings.

Estas organizitaj ekskursoj al "Alpoj de Villach", "Angulo tri landoj" kaj "Worther Lago", kies prezoj estas 50, 70 kaj 210 ŝillings respektive. La du unuaj estas duontagaj, la alia tuttaga; la prezo de tiu ekskurso inkluzivas tagmanĝon kaj bileton por la ŝipo.

Car la prezo por la loĝejoj estas tre varia, interesitoj petu informojn al la Estraro de HEFA, str. Ronda San Antonio 46-50, 2.^o, 4.^a. BARCELONA-11.

La IFEF-POSTKONGRESO okazos en SALZBURG (Aŭstrujo) de la 17^a ĝis la 19^a de Majo 1975.

Estas antaŭvidita tre agrabla programo. La kongreskotizo estas 150 ŝillings. La paginto de la kotizo rajtas partopreni ĉiujn aranĝojn laŭ la programo sen plua pago.

Informoj ĉe la Estraro de HEFA en BARCELONA.

60^a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Okazonta en Frederiksberg (Kopenhago) Danlando de la 26^a de julio ĝis la 2^a de aŭgusto 1975

Informoj riceveblaj ĉe la konstanta adreso de la Kongreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam - 3002 Nederlando.

XXXV^a I. K. U. E. - KONGRESO

Okazonta en Roma de la 11^a ĝis la 16^a de aŭgusto 1975

Kongresejo estos la moderna, komforta kaj tre alloga Instituto "Domus Pacis".

Krom pri la laboroj de la Kongreso, oni profitos pri la ebleco viziti la neelĉerpeblajn belaĵojn de la Eterna Urbo, kiu en tiu okazo malfermos siajn trezorojn, eĉ tiujn kutime ne facile alireblajn.

Pro la antaŭvidebla granda amaso da partoprenontoj aliĝu senprokraste! Informas: P. Giacinto Jacobitti, Piazza S. Maria Maggiore, 8 - 00185 ROMA, Italujo.